

Tagiĝo 23

*Cirkulero de Esperanto-Junularo en ĈRS.
Eldonas Dŭm osvĕty, odbor Esperanto, Opava – 1955/1,
adr.: Kuzník, J. Rooseveltova 17, Opava*

Telegramo

sendita komence de decembro al Unuiĝo Esperantista Franca, Paris, okaze de traktado pri la ratifiko de Pariz-Londonaj militkontraktoj en nomo de Esperanto Junularo en ĈSR.

Teksto: NI ĈEĤOSLOVAKA ESPERANTOJUNULARO INSTIGAS ESPERANTISTOJN EN FRANCIO AKRE BATALI KONTRAŬ RATIFIKO DE PARIZ-LONDONAJ MILITKONTRAKTOJ. NI VOLAS PACON - DEZIRAS KONSTRUI NOVAN BELAN MONDON. NE PERFIDU ĈEĤOSLOVAKAJN GEKAMARADOJN!
ESPERANTO JUNULARO ĈSR, ROOSEVELTOVA, OPAVA.

UNESCO decidis pri Esperanto

La 8-a Ĝenerala Konferenco en Montevideo agnoskis valoron de Esperanto por la scienco, edukado kaj kulturo.

La Ĝenerala Konferenco de Unesko, ĵus okazinta en Montevideo, faris plurajn decidojn koncerne la Internacian Lingvon. Unue, la Administra Komisiono de la Konferenco ĉiuvoĉe akceptis Universalan Esperanto-Asocian kiel konsultan organizaĵon de Unesko. Tio signifas, ke la ligoj inter ambaŭ mondaj organizaĵoj estas de nun multe pli firmaj kaj ke UEA estos konsultata en ĉiuj aferoj, kiuj rilatas al la problemo de komuna lingvo en la internaciaj rilatoj. Tio speciale koncernas ankaŭ la intelektajn interŝanĝojn kaj la disvastigon de kulturo.

La konferenco plue konstatis, surbaze de raporto de la Ĝenerala Direktoro de Unesko, ke pluraj ŝtatoj esprimis la pretecon enkonduki Esperanton en la lernejojn aŭ plivastigi la jam ekzistantan instruadon en tiu lingvo. Pluraj dokumentoj de la Ĝenerala konferenco rekonas la meritojn de la Esperanto-movado por la proksimigo de la popoloj, por la disvastigo de la kulturo kaj por la helpo al realigo de la celoj kaj idealoj de Unesko.

La akcepta de UEA kiel asocio kun konsulta pozicio okazis la 25-n de novembro, per ĉiuj voĉoj, en la Administra Komisiono, kaj la Plenkunsido konfirmis tiun ĉi decidon la 6-an de decembro per akcepto de la raporto pri la laboroj de la Administra Komisiono.

Sendube tiu ĉi decido (pri la akcepto de UEA kiel asocio kun konsulta pozicio) havas grandan signifon por UEA kaj por la tuto mondlingva movado. Sed eĉ pli grava estas la akcepto de Rezolucio, laŭ propono de la meksika delegacio, en la kunsido de la Ĝenerala Konferenco, la 10-an de decembro 1954, je 17.30 h., en la Granda Salonego de Palacio Legislativo en Montevideo, per 30 voĉoj kontraŭ 5, kaj 17 sindetenoj (la aliaj ne voĉdonis - entute ĉeestis la Konferencon 72 delegacioj).

La akceptita Rezolucio ankoraŭ ne signifas la venkon de la mondlingva ideo, ĝi ne alportas la enkondukon de Esperanto en la lernejojn de la mondo. Ĝi ne efektivigas ian miraklon, eble atenditan de kelkaj en la momento, kiam la Petskribo pri Esperanto estis ĵus startigita; sed tamen ĝi povas esti grava paŝo survoje al la venko, survoje al la ĝenerala enkonduko en la lernejojn. Estas afero de ni, anoj de la mondlingva ideo, eluzi la favoran decidon de Unesko por nia estonta laborado kaj propagando.

REZOLUCIO

Rezolucio, kiu havas la dokumentan numeron 8 C / DR / 116 tekstas (laŭ traduko el la hispanlingva originalo):

La Ĝenerala konferenco, post diskuto de la Raporto de la Ĝenerala Direktoro pri la internacia Peticio favore al Esperanto,

1. notas la rezultojn atingitajn per Esperanto sur kampo de internaciaj intelektaj interŝanĝoj kaj por la interproksimigo de la popoloj en la mondo;

2. konstatas, ke tiuj rezultoj respondas al la celoj kaj idealoj de Unesko.

3. komisias la Ĝeneralan Direktoron plue sekvi la spertojn, kiujn prezentas la utiligo de Esperanto por edukado, la scienco kaj la kulturo, kaj tiucele kunlabori kun Universala Esperanto-Asocio en ĉiuj aferoj, kiuj interesas ambaŭ organizaĵojn;

4. notas, ke pluraj membroŝtatoj deklaris sin pretaj, enkonduki aŭ plivastigi la instruadon de Esperanto en siaj lernejoj, elementaj aŭ superaj, kaj invitas tiujn membroŝtatojn informi la Ĝeneralan Direktoron pri la rezultoj atingitaj sur tiu ĉi kampo (El Heroldo de E.)

Vizitu maskobalon

DE ESPERANTISTA KLUBO EN BRNO LA 19-an de februaro
en hotelo SLOVAN. Dimaĉe la 20-an de februaro je la 9 horo

REGIONA KONFERENCO de ESP. JUNULARO

Aliĝojn, mendojn de tranoktado (indiku ĉu hotelon, ĉu komunan tranoktejon) kaj antaŭpagon Kĉs 10,- akceptas ĝis la 12a de februaro: Jan Werner, Helceletova 16, Brno

*Invitas vin EK kaj
Junularo Brno*

NOVJARA SAĜUMADO

La unua numero en nova jaro, tio estas okazo por klaftlongaj, lacigantaj pripensoj, kiujn ĝusta leganto preteriros kun rimarko, ke tempo estas mono. Sed oni ne povas eviti ilin. La kutimo. Tiel okazas, ke certa parto de papero, disponigita por Tagiĝo estas surskribita per elpensoj de iu, sopiranta la gloron de la sperta literato.

Rigardu tion de proksime: -o, meniam vizitanta Esperantajn entreprenojn, informas vin pri interpretanta por tio raportojn (certe verajn) kaj opiniojn de sia plej bona amiko. Eĉ liaj pensoj ekaperadas inter aro de diversaj frazoj - li admonas la ceterajn, por ke ili partoprenu komunan laboron, ellernu Esperanton k.s. (Tamen li mem tion ankaŭ iam kuratingos). Malgraŭ ĝi vere estas malfacila laboro. Oferema! Li antaŭ ĉio devas havigi al si sufiĉan nombron da vortaroj, lerte paĝumante en ili, kiam penplene li tradukas, vorto post vorto, sian nacilingvan koncepton. Poste trankvila, ke redaktoro de Tagiĝo korektos liajn gramatikajn erarojn, li glufermas kontento la koverton kun fiera konscio, ke li faris ne mankeblan agon per esperantistaro.

Ni jam forlasos lin, ĉar se li ofendiĝus, kiel estus ebla eldonadi la cirkuleron?! (Ja, ĝis nun alvenadas kontribuajoj en redakcion, kiel en ĉi tiu artikolo pri la miraklo; kaj ni jam havas jaron 1955-an!) Sendube estas literata kandidato ankoraŭ pli valora ol -o, kiu fanfaronas kun Esperanto nur li volas viziti fotejon Solnický (en Opava) kaj peti la pretigon de siaj fotoj. (Jam mi vidas antaŭ

mi la acidmienajn vizaĝojn.) Eĉ en la aliaj lokoj ne mankas similaj "entuziasmuloj". Kion al tio diras Praha, Pĕřerov kaj aliaj?

Sed ĉiujn antaŭtimojn flanken, estimataj junularoj "ankaŭ anoj". Ne estas necesa ellerni por vi bone Esperanton. Vi tion ne bezonas. Sufiĉas – kiam vi sekvos tiujn, kiuj siajn leterojn komencigas per "Kara amiko", daŭrigante plue ĉeĉe kaj finas "salutas vin via amiko", - por ke vi perfekte sciu almenaŭ: bonan tagon kaj ĝis la revido. Kun verda steleto sur la jakfaldajo ĉi vortoj al vi permesos liberan movon inter ĉiuj esperantistoj (atentu! se vi ne konas alian fremdan lingvon, tiam la konsilo validas nur sur la teritorio de nia respubliko), se vi decidis ĉeesti kunvenon, amuzvesperon, nikolaŭvesperanton ktp.ktp. Havante feliĉon vi ekaŭdas tie eble ankoraŭ aliajn vortojn, kiujn vi ne konas. Nenion gravas, afablaj aranĝantoj de entrepreno ilin al vi kompleze tradukos. Se vi hazarde renkontos afektivan esperantisto(ino)n, kiu parolas verde eĉ post fino de sia kultura esperantlinva enmetaĵo, ne direktiĝu laŭ proverbo ke pli saĝa cedos kaj obstine al li respondu nacilingve. Fine, kredis al mi, vi ankaŭ tute bone interkompreniĝos.



Ni povas proterrigardi ne eminentan scipopon de Esperanto ĉe komencantoj, sed ĉe longjaraj samidenoj kaj precipe ĉu junularaj funkciuloj neniam. Tiukaze kulpigas multaj grupoj la bazan eraron. Dum kunvenoj oni ne sufiĉe zorgas pri sistema perfektigo de lingvoscia nivelo ĉe siaj anoj. Ne nur tradukado de unu artikoleto daŭranta kvaronhoretan kaj fino, ĉar poste okazas, ke Junularoj aliĝintaj al konkurso akiradas poentojn per ĉiu ebla agado, nur ne en scio de lingvo, kaj ke ĝiaj anoj al via demando embarase respondas - "mi ne komprenas".

J. A. Komenský diras: Každému jazyku máme se učiti spíše praktickým používáním než pravidly. Al ĉiu lingvo ni lernu prefere per praktika uzado ol per reguloj. Jĉs, praktika uzado - konversacio, tio al nia junularo mankas! Certe ĉi maniero de lernado ne estas por ni nekonata; sed ni devas ĝin efektiviĝi, ĉar bezono de novaj aktivaj gvidantoj en nia movado montriĝas urĝe aktuala (mi tion ekkonis leginte plorinsistan peton de unu el samtempaj junularaj laborantoj al la dua: "Mi petas vin, ne edziĝu, ĉar nia movado vin bezonas"!"). Nia tasko en nova jaro estas klara: Se Esperanto estas disvastiĝonta, postulas ne "ankaŭanojn", sed e s p e r a n t i s t o j n !

o o o o o o o o o o

Al ĉiuj legantoj mi deziras sukcesojn en poresperanta laboro, al Tagiĝo multe da kunhelpantoj kaj pli bonan pentriston, por ke la tradukinto de poemo "Sentimentalaj drinkuloj" (vidu la 21-an numeron) ne havu jam motivon por ekscitiĝo.

Sincere via "Tiusamaĉo"

oooooooooooo

Karaj geamikoj!

Nova jaro 1955 devas signifi por nia junulara movado novan vojon, ĝi signifu por ni pli energian kaj sindonan laboron poresperantan kaj fine ĝi nepre signifos sukceson, se ni honeste nian taskon plenumos.

Oni ofte meditas kiel labori plej efike por Esperanto. Nu, geamikoj, ni diru sincere, ke multaj el ni primeditas ĉi tiun temon pli ofte ol estas sane, dum ili konkrete faras nenion! Ni konsciu, ke movado bezonas urĝe laboron - ni diru formikan laboron kaj ne grandiozan babilon kaj meditado!

La tempo, kiam izolita esperantisto nur revis pri la beleco de estonta monde en la radioj de verda stelo – estas for! Hodiaŭ senfruktan revadon devas alterni serioza laboro, ĉar ni la sopiratan mondon devas mem konstrui!!! Hodiaŭ bezonas nin la kolektivoj de junaj samcelanoj; ne bone faras tiu esperantisto, kiu sidas hejme kaj Esperanto-klubon en sia urbo aŭ vilaĝo tute ignoras! Ne senkulpigas lin eĉ tiu kontraŭdiro lia, ke li diligente studas kaj legas Esper. librojn. Li ne helpas al la movada, li estas ĝia velkinta folio....

Nia movado bezonas hodiaŭ homojn, kiuj gvidus grupojn, kiuj konstante kulturus intereson, entuziasmon kaj idealon de la membraro. Tiu laboro estas vere streĉa, ofte nekomprenata kaj substsaksata. Certe simpliĝas en grandaj urboj, ke estas multaj malnovaj, spertaj gesamideanoj, kiuj volonte helpas. Sed aliel la afero aspektas tie, kie Junularo devas batali mem por sia ekzisto. En tiuj lokoj la ĝusta gvido de la junulara movado estas eminente grava!

Ni volus helpi al vi! Ni scias pri la malfacilaĵoj, kiuj vin fidele akompanas! Vi ekzemple gvidas kurson: mankas lernolibroj, mankas sperta instruisto, ofte perdiĝas entuziasmo ĉe la frekventantoj....

Kiel realigi ilin?

Junaj homoj ne povas konstnte lerni kaj lerni. La esenco de vivo js avidas je ŝanĝoj kaj varieco!

Atentu, gvidantoj kaj kursestroj!! Ĉi tiuj psikaj statoj de la junularo devas esti kriterio por via laboro ! Vi nur dufoje malbone ilin komprenos kaj la efiko de via laboro estos preskaŭ nulo!

INSTRUU AL JUNAJ GESAMIDEANOJ DIVERSAJN KANTOJN! La kantoj estas veraj bildoj de juna animo, sopiras, meditas, batalas same kiel ĝi. Instigas al noblaj agoj, vekas ĝojon kaj entuziasmon!

ELEKTU EL VIA MEDIO BONAN DEKLAMANTON! Esperantaj poemoj ja estas riĉaj kaj belsonaj, variaj. Ili alportas en viajn kunvenojn ŝanĝon, ĝojon kaj amuzon !

NE FORGESU TEATRAĴOJN! Ne diru, ke ĝis hodiaŭ via kolektivo neniam ludis teatraĵon! Tio estas superflua elturniĝo kaj subtakso. Nur komencu kaj vi ekvidos!!! Teatro-grupo ja estas bonega okazo por perfektigo kaj firmigo de junulara kolektivo!

Karaj geamikoj, vi legas ĉi tiun artikolon, sed je la fino vi certe konkludas: Tiuj, kiuj tiel oratoras, certe venis el XV. jarcento. Ni ja bone scias kion fari, sed ni ne povas, ĉar ne ekzistas materialo konvena, t.e. kantoj, poemoj ktp.

Ho vere! Libroj, kantoj ktp. ne estas ĉe ni eldonataj plu. Sed tamen la situacio ne estas tiel nigra. Kvankam malgranda, tamen ia provizo ekzistas!

Turnu vin al ni kaj ni laŭeble helpos al vi aŭ sendos ion aŭ konsilos.

Ni scias: ofte okazas vesperetoj, baloj kaj konferencoj por kiuj ecesas kultura enmetaĵo, sed kion kanti, ludi, deklami??

Por eviti ĉi tiun konfuzon, skribu al ni kion vi deziras kaj ni laŭeble helpos. Indiku ekzemple kian entreprenon vi intencas okazigi kaj ni klapodos konsili al vi pri la konvena programo.

Sed krom tio – SENDU ANKAŬ VI al ni kantojn, poemojn ktp., kiuj ĉe vi sukcesis, por ke ni povu ilin uzi en aliaj lokoj!

Pripensu ĉi tion! Via kunveno, entrepreno nepre bezonas kulturalan programon. NE

SUBTAKSU ĜIN !!

En venonta numero ni mencias pli detale kelkajn similajn problemojn.

Salutas vin
Chlubnová Draha,
Charbulova 90 , Brno 18

Novobilský Vlastimil
Na Újezde 11/II - Praha. III.

NIA SPEGULO

Nova Esperanta gazeto aperis.

La 6.1.1955 estis eldonita la 1-a numero de Esperanta, ankoraŭ nur modesta gazeto NIA SPEGULO en Trenčín (Slovakio). Ĝi fariĝos eble organo de nova konsulta komisiono, proponita en Olomouc, dum la konferenco en Januaro. Ni gratulas al oferema laboranto s-ano Lamačka, kiu alportis tiamaniere al tuta Esperantistaro en ĈSSR novan lumon de sukceso.

Ĉiuj mendu la novaperintan gazeton "Nian Spegulon" je adreso:
Ján LAMAČKA, TRENČÍN, Pod Sokolicami 1975, Slovakio.

REGIONA KONFERENCO en Olomouc

La 8-9-an de januaro aranĝis Esperanto-grupo en Olomouc regionan konferencon, kiun ĉeestis preskaŭ 200 esperantistoj el tuta respubliko.

Sabate estis amuzvespero kun riĉa valora programo kaj prelegoj. Dimanĉe vizitis multaj ĉeestintaj ges-anoj katolikan Diservon kun esperantlingva prediko kaj kantoj. Je la 9-a horo komenciĝis la laborkunveno, inaŭgurita per himnoj ĉeĥa, rusa kaj Esperanta luditaj de gramodiskoj. Poste sekvis deklamo de poemo de Zamenhof: Preĝo sub verda standardo. Interesa prelego de s-ano Římský: Kiel lerni kaj instrui Esperanton, montri al ĉiu vojon kiel sukcese agi por nian aferon konduki al sopirata celo. S-ano Hromada raportis pri la sukcesa decido de Unesko pri Esperanto kaj pri evoluo de Esp. movado en nia lando.

S-ano Slaný per kelkaj vortoj klarigis la demandon: Kosmopolitismo kaj internacianismo.

La plej ĉefan aferon de la kunveno, kiu eble estas la ŝtupo al la pli bona agado de esperantistaro en ĈSR, kaj al la plivigligo de nia movado estis solvo de demando kiel organizi la kunlaboron inter la Esperantistaj grupoj. S-ano Miloš Rudolf proponis la starigon de konsulta komisiono konsistanta el nuntempaj aktivuloj en Esp. movado. La tasko de tiu ĉi komisiono estos doni al grupoj centrajn taskojn, kiel daŭrigi iom celkonscie la agadon de grupoj.

Post la raportoj de unuopaj delegitoj pri la stato de Esperanta movado, estis la antaŭtagmeza kunveno finita, sed ankoraŭ posttagmeze kunvenis la ĉeestintaj proponitaj anoj de nova konsulta komisiono por pli detale difini ĝian labormanieron. Certe la rezultojn de nova komisiono kaj pri ĝia agado ni ofte legos en Praha cirkulero – Bulteno kaj en nove aperinta presmaniere aranĝita „gazeto“ - NIA SPEGULO – en Trenčín, kiu fariĝos eble la organo de la supre meciita komisiono.

La konferenco vere sukcesis kaj eble alportos novan lumon por nia plua laboro.

Ofte ni solvas malfacilan problemon, paroli dum kunvenoj nur Esperante. Tre efika helpilo estas ludo, kiun ni nomas "Ĉasado de verda kastoro". Estas elektitaj du aŭ tri gesamideanoj kiuj ricevas taskon de komenco ĝis fino de kunveno paroli nur Esperante. Sed ne silenti Esperante; elektitaj s-anoj devas samtempe ricevi taskon. Ekzemple nun gvidas ian ludon, dua preparos novaĵojn el presaĵo kaj simile.

Ĉiuj kunvenantoj gardas ilin, ĉu iu ne eraris. Se iu eraras dufoje, devas venonte komenci denove. Kondiĉojn povas ĉiu grupo laŭ la cirkonstancoj ŝanĝi, kaj rekompenci la gajnantojn.

Kion faras niaj grupoj?

Preskaŭ en ĉiuj junularaj grupoj komenciĝas aŭtune Esperanto kursoj, kiuj estas daŭrigataj kun diversaj rezultoj. La detalajn raportojn sendadas regionaj delegitoj al ceteraj reg. perantoj, do ni atentu nur la agadon kiu interesos ĉiujn.

Reg. delegitoj s-anoj Werner kaj Novotný pridiskutis en siaj cirkuleroj diversajn fragmentojn de junulara konkurso kaj donis kelkajn rimarkojn kio ne plaĉis al ili en la konkurso. Ni ĉiujn iliajn proponojn pridiskutos en venontaj junularaj kunvenoj kaj nur en fino de jaro ni faros eblajn ŝanĝojn, ĉar ne estus utile ŝanĝadi ĉiumomente nian labormanieron. Tial ni petas kiel reg. perantojn, tiel la lokajn delegitojn, ke ili agu precize laŭ la instrukcivoj pri la konkurso, kiel estis en lasta cirkulero difinite.

Tre regule sendas raportojn RD VI. Novotný el Praha kaj s-ano Werner el Brno kaj estas evidenta ke tie ankaŭ la junularmovado progresas. Ankaŭ Sudbohemio pere de RD s-ano Křivánek el Písek vidigas signojn de ia vivo. Raportojn mi havas ankaŭ el Bratislava kaj Olomouc, malofte ankaŭ de Ostrava Reg. delegito. Estas mirinda, ke malgraŭ la aktiva agado en pasinta jaro de RD s-no Franc el Pardubice, nuntempe jam longe silentas kaj ni ne scias ĉu li ankoraŭ „vivas“. Tamen ni scias ke junularo en Pardubice vivas kaj progresas.

Jen kelkaj fragmentoj el la vivo de junulargrupoj:

Prahanoj aranĝis sukcesan vesperon, multajn prelegojn. Junularo el Brno efektivigis en la klubo 3 tutvesperajn programojn. "La lasta viro", komedio de F. K. Svoboda, kiun ludis tuta Junularo, diversaj prelegoj: Rimarkindaĵoj el la mondo kaj Rekordaj rapidoj en aero, sur maro kaj tero. Tie estis ankaŭ fonditaj 2 rondetoj: teatra kaj traduk-rondeto. Altlernejanoj kunvenis kaj decidis skribi rezolucion, kie ili instigis kunlabori kun siaj kolegoj en ĈSR kaj en tuta mondo. Ili ankaŭ laboros en kadro de Junularo.

La devizo de Brna Junularo estas: Subtenu la decidon en niaj anoj fariĝi ĉiuj spertaj esperantistoj - instruistoj de Junularo.

Junularo en Brno disponas per diversaj prelegoj kiujn vi povas postuli de ili por propraj bezonoj.

Ĝoja estas la sciigo, ke kurso aranĝita en Svitavy finis kun 100% sukceso. Adresoj kaj fotografita tablo de kursistoj jam disflugis en la mondon. Al ilia sukcesa laboro, kiu vere komenciĝis nur pasintjare ni deziras pluan persistemon.

En multaj junulargrupoj estis dediĉitaj vesperoj al la rememoro de memortago de Majstro L.L.Zamenhof.

Junularo Třebíč jam nun preparas sin por aranĝi ĉi-jare la kutiman Someran tendaron.

Esp. grupo en Olomouc aranĝis letervesperon kiu tre sukcesis kaj iliaj anoj jam ekkorespondis.

Laŭ la raportoj belajn, ofte ŝanĝatajn propagandkestetojn havas grupo Olomouc, Kroměříž kaj aliaj.

Ĝojiga raporto atingis nin jam pasintjare, ke en Bratislava estis fondita junulara esp. grupo, kiu montriĝas jam nun aktivan laboron. Eble ĝi estos fajrero kiu bruligos la disvolviĝo de Esp. movado en Slovakio.

Se ni povas nur provizore taksu la laboron de la junularaj grupoj ni povas diri, ke la unuajn lokojn okupas junularoj Brno, Praha, Olomouc, Bratislava, Svitavy. Certe ne dormas ankaŭ aliaj, sed eble ni nur pro la manko de raportoj de Lokaj kaj reg. perantoj ne scias ĉion pri ili. Venonte ni volas publikigi adresojn de ĉiuj lokaj kaj reg. del. Nepre sendu la adresojn al viaj reg. perantoj. Ne forgesu.

JUNULARO EK AL LABORO!

Tagiĝo - Ĉu vi jam reabonis ĝin?

Jam unua numero en la jaro 1955 estas dissendata al gesamideanoj en nia respubliko kaj eksterlande. Pli vasta eldono, 12-paĝa kaj pli bone aranĝita tiel prezentas sin la Tagiĝo al vi.

Ĉu vin ne intereas la laboro de esperantistaro, kaj ĉefe la laboro de Esp. junularo? Ĉu vi jam plenumis vian malgrandan devon kaj reabonis ĝin por vi aŭ por viaj eksterlandaj geamikoj? /al kiuj ni ĝin sendadus/.

paginte Kĉs 8.--

per la pasinte almetita ĉekpagilo aŭ se vi ĝin ne havas du sendu monon al nia ĉekkonto ĉe STSP Opava, numero 8155.

Nia peno estos eldonadi Tagiĝon regule kaj 10 - 12 paĝan. Ni, esperas, ke ankaŭ la rango de Tagiĝo estos pli belaspekta, ĉar aliĝis por kunlabori estinta redaktoro de fame konata "JUNULARO AGU" eldonata en j. 1952 en Gottwaldov, kiu prizorgos la skizojn kaj ĉiujn grafikajn laborojn en Tagiĝo.

Do je la reaŭdo niaj pluabonantoj kaj adiaŭ samideanoj silentiĝintaj.

Via

Tagiĝo

SOMERA ESP. TENDARO

okazos ankaŭ ĉijare. Kie? En ĉirkaŭaĵo de akvobaro Vranov. Bela regiono, bela medio de june sentantaj homoj, kiuj deziras la progreson de Esperanto, sed ĉefe fare de propraj fortoj kaj propra aktivigo. Kursaro estas proponita denove je 3 etapoj po 14 tagoj kaj daŭros dd 4-a julio ĝis 15-a de aŭgusto. La instrumaterialo estas jam nun preparata kaj por kursaro estas garantiataj bonaj instruistoj (inter ili ankaŭ s-ano Th. Kilián el Třebíč).

Jam nun ĉiuj geknaboj aŭ ankaŭ pli aĝaj samideanoj kiuj sentas siajn korojn ankoraŭ junajn kaj estas pretaj helpi al junulara movado, pripensu la aferon kaj garantiu por vi la libertempon dum la supre menciita dato.

Ni dankas:

Ni dankas al s-anoj Svačina Fran el Lanžhot, Hořejší Josef el Plzeň, Franc Karel el Pardubice kaj al Křivánek Libor el Písek por la prizorgo de papero por nia cirkulero. Nia helpo permesas al ni donadi la Tagiĝon kaj ankaŭ plirandigi la eldonkvanton.

TAGIĜO dankas al vi.

Okazis

Antono antaŭ ne multaj jaroj vizitadis lernejon kaj prepariĝis al ekzameno de matureco. Jarduonaj ferioj. Antono forveturis al gepatroj en malrandan vilaĝeton. Iomete ripozi kaj ekĉerpi novajn fortojn por lernado. Unutage antaŭ tagmeza li iris en kampojn. Li observis dometojn

ĝibokliniĝintaj al la tero inter nudaj, senfoliaj arboj. Ne malproksime komenciĝis arbaro. Li enpaŝis ĝin. Hejmen li revenis ĵus kiam la patrino vokis lin manĝi. Sur korteto apud la barilo li kaŝis ion, alportitan el sia promeno. Tuj post tagmanĝo li eliris eksteren, prenis kaŝitan objekton kaj iris malantaŭ la garbejo. Okuloj scivoleme rigardis trovaĵon. Dekstra mano tenis la tenaĵlon. Poste oni aŭdis nur krakegon

Antonon oni liberlasis el la malsanejo li iris en – blindulejon. Li eklernis ĉi tie skribi sur maŝinskribilo, kaj faris eĉ ŝtatan ekzamenon. Sed kiam li serĉis laborlokon, montriĝis ĉiu klopodo vana. - Vi bone skribas, sed vi estas blinda. Mi bedaŭrinde ne povas okupi vin: tiel kaj simile sonadis la respondoj. Antono denove komencis lerni, kiel brosis to mi povos pli bone valorigi en pena vivo - menciis li. Tamen de senĉesa nerva streĉo lia volo malfortigadis. Persekutis lin malgajaj, gravaj pensoj. Kuzo kun kiu li studadis, dume fariĝis inĝeniero. Antono havis la saman celon kaj kie li estas?!

Instruistoj rimarkis, ke Antonon jam ne interesas la laboro, kiel antaŭe. Iom post iom li fariĝis malsociemulo. Li ĉesis reagi je demandoj. Raraj estis momentoj kiam estis por iu eble kun li paroli. Li vagadis kiel ombro en la koridoroj de konstruaĵo sen celo, sen senco. Videble li kadukiĝis. El iama knabo fariĝis homo kun maljuna mieno en vizaĝo, ŝiriĝintaj vizaĝtraĵoj kaj nekomprenebla rideto. Sidante, sur forlasitaj lokoj li laŭte ekridadis. Eĉ nigra punkto, kiu lin ĉirkaŭprenis devis ektemi aŭdinte ĉi ridegon. -- Ne daŭris longe kraj oni devis Antonon forveturigi en frenezulejon.

Kaj kie estas la kaŭzo? Eble vi diros, lia nesingardemo, sed la propra kaŭzo? Milito! - Krakaĵo, kiun li trovis en arbaro restaĵo de la milito. Ĝi estas tiu terurego, kiu al ni forprenis tiom da junaj, sanaj homoj eĉ ankoraŭ post sia fino. Kiom da similaj Antonoj povus hodiaŭ trankvile labori kun siaj samcivitanoj, feliĉe travivi en rondo de siaj karuloj sian vivon sen teruraj pensoj de sento de malplivaloreco, kiu enkondukas iun trafitan homon ĝis al similaj finoj, kiel en ĉi tiu okazo.

Pro tio ankaŭ vi kontraŭstaru la preparadon de nova mondmilito, por ke neniam estu novaj superflujaj mortigoj kaj kripluloj. Vi certe deziras la sunan, helan vivon por vi, deziru ankaŭ al aliaj homoj kaj defendu kontraŭ ĉiuj sangosoifaj vivrabistoj.

- MRAK -

Samideanino Šupichová, kiu jam de kelkaj monatoj estas grave malsana kaj ne povas tutkore dankas por multaj bondeziroj okaze de la Kristnaska kaj Novjaro, kiujn ŝi sincere ripetas.

Ŝipanaĵaj aventuroj

Kelkaj rememoroj el orientgermana urbo Odanberg, kie ni troviĝis antaŭ ia tempo kun nia vaporŝipo "Ostrava" en ŝipkonstruejo. La vivo en orienta Germanio estas sufiĉe bela, malgraŭ tio, ke ĉi tio ekzistas ankoraŭ la manĝokartoj por la graso, viando kaj sukero. La butikoj estas plenaj de diversa varo kaj ĉefe la laboristo povas por sia salajro aĉeti ĉion, same kiel en aliaj popoldemokratiaj ŝtatoj.

La vendistoj estas ĝentilaj kaj komplezaj kaj vi ne bezonas ĉagreni, se vi ne konas nomon de la aĵo, kiun vi deziras aĉeti, ĉar se la vendisto vidas, ke vi ion deziras, li preskaŭ ĉiam komencos porti al vendotablo el diversaj anguloj diversan varon, tiel longe, ĝis kiam vi ekvidos la deziratan aĵon kaj montros al ĝi: "Tion mi aĉetos."

En ŝipkonstruejo, kie ni nun estas kun la ŝipo, ni faris al unu laboristo malgrandan afablecon. Li volinte iel rekompenci nin, invitis nin sabate al dancvespero, kie li gvidis la muzikistaron. Vi akceptis inviton kaj sabate vespere ni enfosis la puran kaj belguste ornamitan amuzejon, eksidis ĉe la tablo kaj trinkis ĉiu laŭ sia kutimo. Du trinkis bieron, unu limonadon kaj unu specialan germanan likvoron "kakao kun nukso". La muzikistaro ludis forte, la dancistoj saltetis kaj la vespero fluis. En Germanio en multaj lokoj estas pli multe de knabinoj, do multfoje dancas komune du knabinoj. Kiam la dancamuzo jam boliĝis, eksonis la korneto kaj la muzikistarestro anoncis per sia biera voĉo, ke: "Nun estas – solo - por ĉefaj ŝipanoj".

Ni frostremiĝis malafable de surprizo rigardante unu la aliani kaj observante, ke ĉeestantoj jam faras grandan rondon ĉirkaŭe, kiel estas kutime ĉe la "solo". El kvin ŝipanoj nur du sciis danci. Ni estis en malbona situacio, sed tamen nia ŝipkapitano havis bonan penson kaj savis nin dirante: "Jes, estas solo por ĉeĥaj ŝipanoj, sed ne estis dirite, ke ni ĉiuj devas danci. Du kiuj konas danci iru tuj kaj la ceteraj plivigliu ilin per la kantado". La ideo estis bona kaj tuj farita. La muzikistaro ludis ĉeĥan kanton: „Tie ĉe la akvo kreskas trifolio" je nia honoro. Du ŝipanoj-dancistoj preninte simpatiajn virgulinon tuj komencis turniĝi kaj tri ceteraj krantis ĝis la arboj verdiĝis.

La danco bone finis kaj denove daŭris la amuzo, kiu tamen alportis al ni malbonan okazaĵon. Unu ŝipano, kiu trinkis la likvoron akceptis inviton de gastemaj germanaj popolaj policanoj trinki kun ili glaseton da likvoro por amikeco (Freundschaft). Li trinkis kun unua glaseton, denove donis al li la glaseton dua kaj poste ĉiuj policanoj, kaj tio kaŭzis, ke ni devis uzi la sciojn el kurso de ruĝa kruco pri portado de vunditoj kaj porti nian kamaradon sur ŝipon.

Ankaŭ mi informis pri Esperanto. La laboristo al kiu mi turniĝis respondis, ke ĝi estis malpermesita, sed eble la oficejoj jam ŝanĝis sian decidon.

Sek

NI HELPAS AL NI:

Všetchna čísla i jednotlivě oběžníku Tagiĝo a JUNULARO AGU, ročníky 1950, 1951, 52, a 1953 zašlete na adresu Tagiĝa. Velmi nutné. Odměníme esp. knihou nebo propagačním materiálem.

Grupo de diversaĝaj gejunuloj deziras korespondi kun ĉeĥoslovakaj ges-anoj. Adreso: Paul Glökner, Damaschkostrasse 32, Pirna-Gopitz, Sachsen, DDR.

ELLERNI

Daŭrigo de argumentoj por Esperanto (Vidu Tagiĝon N-ro 21)

26. SVĚTOVÝ SJEZD OBRÁNCŮ MÍRU VE VARŠAVĚ r. 1950.

"Domníváme se, že brzdění výměny kulturních hodnot mezi národy vyvolává konflikty, vede k nedostatku vzájemného porozumění, vyvolává ovzduší nedůvěry a tak vytváří podmínky, vhodné pro válečnou propagandu. Domníváme se, že posílení kulturních vztahů mezi národy vytváří nejvýhodnější podmínky pro vzájemné porozumění a upevňuje jejich důvěru ke společnému boji za mír. Proto se obracíme ke všem vládám s výzvou, aby pomáhaly zlepšovat kulturní styky mezi národy, aby jim umožnily vzájemné poznání jejich kulturních pokladů.

Žádáme, aby ulehčily pořádání mezinárodních konferencí kulturních pracovníků, návštěvy z jedné země do druhé, vydávání a co největší rozšíření děl literárních a výtvarných."

/Z poselství Spojeným národům, par. 9.) ("Dansk Esperanto B1 ad 11/52/.

27. SVĚTOVÁ RADA MÍRU

"Poslední zasedání Světové rady míru jasně ukázalo nutnost a možnost širokého rozvoje výměny kulturních hodnot jako důležitého činitele pro zmírnění mezinárodního napětí.

Jestliže všechny organizace a všichni lidé, kteří mají zájem o kulturu své vlasti i ve světě, se rozhodnou navázat spojení a plodně pracovat pro mezinárodní styky na základě vzájemného porozumění, otevrou se další široké perspektivy. Všem podnikům, které již byly uskutečněny nebo se připravují, jako jsou návštěvy, výměny delegací, uměleckých děl, literárních a vědeckých publikací, mezinárodní výstavy, sjezdy a setkání vědců, umělců a sportovců, je zaručena plná podpora mírového hnutí.

Vyzýváme všechny organizace a všechny lidi, kteří mají zájem o rozvoj kulturních styků mezi národy, aby zesílili svou činnost, aby jejich dílo bylo ještě účinnější."

(Podle "Rudého práva" z 30.11.1953)

(Kompilis kaj tradukis Jaroslav Mařík laŭ fontoj en teksto inikita.)

Pluaj argumentoj por Esperanto.

J. A. Komenský r. 1641 ve spise "Via lucis" (Cesta světla) píše:

"Nevyhnutelně tedy i nyní, když světa veškerého náprávy hledáme, třeba bude jednoho jakéhosi jazyka společného. A toho, ač zdá se nesnadným čímsi býti, přece není... Nebo snáze všechněm naučiti se jednomu čemusi než jednomu někomu všemu ..."

"Jeden jazyk obecný světu je potřeben a kdyby jiného nebylo, náleželo by spíše latinu k té potřebě ustanoviti než který jiný. Ale že myšlenky naše nyní výše jdou, nemůžeme si pomoci, abychom raději k naprosto novému neradili jazyku ..."

"Je potřebí utvořiti jeden jakýsi jazyk, kterým by lidé učení i přenevzdělaní mluvíti mohli ..." (Viz spisy Komenského!)

Tolstoj napsal r. 1894:

".... Aby si lidé rozuměli, je nezbytno: buď, aby všechny jazyky splynuly v jeden, aneb aby znalost jazyků podle potřeby se rozšířila nebo aby jeden jazyk za společný byl vyvolen, nebo posléz, aby všichni ..."

Tot' idea esperantistů. Zdá se mi, že tato poslední myšlenka je nejrozumnější a – což je nejdůležitější – nejsnadněji uskutečnitelná."

Rektor francouzské university v Dijonu prof. Dr. El. Boirac pravil o Esperantu, že se hodí k vyjadřování pomyslů i nejjasnějších, přesných a abstraktních, jak v literatuře, tak i ve vědě a filosofii ..."

Marie Majerová v předmluvě ku knize „Urbo sub signo de fajro“: La artefarita lingvo Esperanto ne estas ja la sola internacio komprenilo. Sed ĝi servas kiel tia al certa parto de ĉiu nacio kaj sekve helpas en paca celado. Tial ŝatas tradukon de nia verko en tiun ĉi lingvon.

82 jaroj de F. L. Lorenz

La 24-an de decembro atingis la 82-an jaron de sia aĝo nia altestimata samideano František Vladimír Lorenz en Don Feliciano, Brazilo. Lorenz naskiĝis en 1872 en Bohemio. Esperantisto de la unua horo, li estas versimile ankaŭ la plej malnova vivanta esperantisto en la mondo. Kiel dekokjara junulo li verkis la unuan lernolibron de Esperanto por ĉeĥoj, eldonitan en 1890 en Pardubice. Estante persekutata de la aŭstria polico pro siaj progresemaj ideoj, li rifuĝis en Brazilon, kie li estis la unua homo, parolanta Esperanton.

Lorenz partoprenis ĉiam aktive la movadon por la internacia lingvo, sed lia plej signifa agado estas la literatura (precipe tradukoj en Esperanton el 44 lingvoj, ekz-e Bhagavad-Gita el la sanskrita originalo kaj Diverskolora Bukedeto). Lia literatura aktiveco ampleksas 16 gravajn librojn kaj 20 volumojn de tradukoj en la portugalan lingvon. Honore al nia fama samlandano, la brazilaj esperantistoj en Santos fondis en 1940 Esperantistan Grupon "Francisco Valdomiro Lorenz".

Ni sincere salutas nian brazilan samideanon kaj samgentanon kaj deziras ankoraŭ multajn jarojn al lia fruktoriga vivo, vivo tiel nekutima!

El "Diverskolora Bukedeto" mi represas montraĵeto de la tradukarto de Lorenz:

AMKANTO DE AMAZONAJ INDIANOJ

Rudá, Rudá,
loĝanto de l' ĉiel',
de l' pluvo vi amik',
mi nun petegas vin:
faru ke l' amat'
sentu amon nur al mi,

kaj ne al alia ajn virin',
kaj ĉi-nokto li vizitu min!

(Tradukita el la tupia lingvo. - “Rudá” estas la tupia nomo de Amoro, dio de la amo.)

J.M.